



La modelo de civila malobeado estis eksportita al aliaj landoj. En Usono, aktivuloj kontraŭ la milito en Vjetnamujo agis en simila maniero. Alia fama adepto estis la usona pastoro Martin Luther King, kiu batalis por la rajtoj de nigruloj en Usono. Ankaŭ en Palestino, meze de multe da perforto, ekzistas palestinanoj, kiuj havigas al si rajtojn per pacaj manifestacioj. Eĉ en Brazilo, en la fino de la 19-a jarcento, la movado por abolo de sklaveco havis similecojn kun tia agado.

En la jaro 1914, oni nomis Gandhi “mahatmo”, kio estas honoriga titolo signifanta “respekteginda”. Li pledis por toleremo en la socio, kiu estis de longe dividita je religiaj kaj aliaj rivalecoj. Ofte li submetis sin al longaj fastoj por atingi siajn celojn en la politiko. Ĝis nun, la partio fondita de li aktivis en Hindujo. Malgraŭ sia pacemo, Gandhi estis murdita per pafado, fare de fanatikulo.

Gandhi estis granda admiranto de la fama rusa verkisto Lev Tolstoj (1828-1910). Ĉi tiu partoprenis en milito en Krimeo kaj poste alprenis pacisman manieron konsideri la homojn kaj la homajn rilatojn. Estas iaspeca ironio de la destino, ke Gandhi prenis sian inspiron por neperforta agado el la mesaĝo de alia granda humanisto: de Tolstoj.

Tiun ĉi sonartikolon verkis kaj produktis Paŭlo S. Viana el Brazilo.

El la Esperanta Ret Radio <https://esperantaretradio.blogspot.com/>

## **107-a UK en Montrealo**

La Dua Bulteno de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), okazonta en Montrealo (6-13 aŭgusto 2022) haveblas rete per la paĝo de la UK: [uea.org/kongresoj](http://uea.org/kongresoj). La Dua Bulteno donas utilajn informojn pri la lando kaj la kongreso, sed plej grave prezentas mendeblajn servojn de la UK, kiel hoteloj, ekskursoj kaj bankedo. Disponeblas versio de la Dua Bulteno rekte konsultebla sur la paĝo de la UK, aldone al PDF-versioj (kvalita, 10 Mb; kaj malpeza, 4 Mb) kaj al la reta mendilo: [uea.org/kongresoj/mendilo](http://uea.org/kongresoj/mendilo)

**Atentigo pri eraro en la numero 3/2022.** Mi petas pardonon de la legantoj, ke mi pro iu al mi nekonata kialo faris gravan eraron en la 8a paĝo de la marta Informilo en la unua linio mi indikis kiel tradukinton de Manon Lescaut erare Vlastimilon Novobilský. La vera tradukinto estis Jiří Kořínek. Samtempe mi dankas al Věra Novobilská, filino de la tradukinto, ke ŝi atentigis min pri tiu mia tre malagrabra eraro. Petr Chrdle

### **Jubilea 40-a Poludnica – kun omaĝo al ĝia fondinto**

La evento “Poludnica” (laŭtraduke “Tag-feino”) festis ĉi-jare sian 40-jariĝon. Bedaŭrinde, la jubileo havis sian malgajan aspekton – la evento estis dediĉita al la memoro de la fondinto kaj “spirita patro” Ján Vajs, kiu subite forpasis en septembro 2021. Ne certas, ĉu ankoraŭ okazos ontaj “Poludnica” – des pli necesis eluzi la ŝancon veni al tiu ĉi, jubilea! Efektive temis pri la unua ĉi-jara ĉeesta Esperanto-evento en Slovakio (organizita de SKEF, kunlabore kun LEK), kaj eble eĉ unu el la unuaj internaciaj Esperanto-aranĝoj tutmonde.



La ĉefa programo de la evento estis sabata supreniro al la monto Poludnica en la Malaltaj Tatroj de Slovakio (laŭ kiu la aranĝo nomiĝas), tamen ja la kerna grupo de esperantistoj partoprenis la tutan programon kaj ĉeestis ekde la 6-a ĝis la 9-a de januaro 2022.

La programo estis riĉa kaj bunta – la plej multaj alvenis al la pensio “Victoria” en la civito Liptovský Ján jam ĵaŭde posttagmeze kaj ankoraŭ antaŭ mallumiĝo sukcesis trarigardi la vilaĝon, viziti la apudan “Sanktjohanan elrigard-turon” (Svättojanska rozhľadňa) kun belega panoramo al la ĉirkaŭaĵo. Vespere sekve la plej kuraĝaj kaj adrenaliniĉaj ekuzis la ŝancon iri al publika ekstera varmakvofonto “Kaďa” (Bankuvo) – dum ekstere estis -10 gradoj, kaj la akvo havis ĉ. 17 gradojn. Sekvis ankoraŭ spektado de kelkaj filmetoj omaĝe al Johano Vajs, ligitaj al li kaj al liaj turismaj eventoj, brile prezentitaj (kaj plej multaj ankaŭ rekte filmitaj) de lia samklubano Peter Rybín. Vendrede matene la grupo vizitis la najbaran kavernon “Stanišovska”, posttagmeze laŭvice la Muzeon de naturprotektado kaj speleologio en la apuda urbo Liptovský Mikuláš, kie majstre gvidis nin la longjara kaverna kolego de Johano Vajs: Peter Holúbek. La sekva sabato estis dediĉita ĉefe al la supreniro de la monto “Poludnica”. La grimpadado ekis ĉ. 9:00 horo matene, kaj daŭris ĝis ĉ. 15:00. La vojo estis relative facila komence, kun ne multa neĝo, tamen en la pli supra parto jam necesis paŝi multe pli atenteme pro pli multa neĝo kaj glacio. La vetero estis tamen bonŝance ideala – kun suno tuttage, kiu ebligis ĝui belegajn panoramojn. Sur la pinto de la “Tagfeino” estis starigita de Johano Vajs jam antaŭ multaj jaroj “Esperanto-obo” (iaspeca “sankta loko”, kreita el ŝtonoj, kiujn portas tien diversaj esperantistoj el siaj tutmondaj vojaĝoj). Ĉi-jare oni lasis tie ne nur siajn ŝtonojn, sed alportitaj estis ankaŭ la kolekto de ŝtonoj, kiujn havis ankoraŭ en sia stoko Johano mem – sed mem ne plu sukcesis porti tien. Aldone – eĉ parto de li restis en la obo – laŭdezire de lia familio (kiu kunĉeestis) oni disĵetis parton de lia cindro sur la obon. Do eblas diri, ke nun Johano daŭre restas sur Poludnica... La subeniro estis malpli komplika fizike, tamen oni devis bone atenti, por ne gliti kaj vundiĝi – sed la subeniro ja ĉiam estas pli agrabla parto de la turismado en montoj. Sekvadimanĉe ankoraŭ okazis prelego de E@I-teamanino, Daria Slonova, pri komparo inter Slovakia kaj Rusia vintra turismado, kaj fine ekskurso al apuda muzeeto, “Mincovníčkov”

(Monerejo), kiu prezentis en tre ĉarma kaj interaga maniero la “vivon de monero” – ekde la ministra laboro tra prilaboro de metalo ĝis kreo de konkreta monero. Certe rekomendinda loko!

Aldone ankaŭ la vesperaj programoj estis riĉaj kaj allogaj: dufoje okazis gitaraj koncertoj de Mária Minichová, dufoje prelegis interese kaj interage pri turismaj lokoj Adam Wilkus el Pollando, kaj ĉiuvespere prezentiĝis vojaĝaj kaj turismaj filmetoj de la loka klubano kaj filmisto Peter Rybín. Kion diri fine? Malgraŭ la fakto, ke la fondinto de la evento ne plu estas inter ni, ni esperu, ke la evento plu ekzistos kaj allogos diverslandajn esperantistojn – turistojn kaj vojaĝantojn. Ĉu en 2023 la aranĝo do re-okazos? Ja tio multe dependas eĉ de vi mem! (Kie troviĝas deziro, tie troviĝas vojo.) Video-raporto pri la evento: <https://mallonge.net/poludnica2022>  
Retejo pri la evento kaj turismaj aranĝoj de slovakaj esperantistoj: <https://poludnica.esperanto.sk/>

## **Esperanta Radio 100-jara**

Estas jubileoj, kiuj rekte aŭ malrekte koncernas nin ĉiujn, la tutan E-komunumon. Kaj tiel estas en 2022, la jaro de la 100-jariĝo de la Esperanta Radiofonio.

En 2022 la jubileon signos apartaj datoj en junio kaj decembro. La 19-an de junio 1922 la usona stacio Newark WJZ elsendis sian unuan programon, kiu enhavis paroladojn pri kaj en Esperanto. La 8-an de decembro 1922 la stacio London 2LO elsendis programon kun paroladoj pri kaj en Esperanto. Jam la sekvan jaron Esperanto aperis en la programo de radiostacioj en pliaj landoj. Ĉiu plia jaro signis novajn konkerojn por E-parolo en diversaj radiostacioj de diversaj landoj. Komence tio okazis en maniero spontana en maniero neorganizita. La kontaktojn starigis unuopaj esperantistoj, aperante antaŭ la mikrofonoj kun sia lingvo. Jam en 1923 aŭdiĝis la unua publika deklaro favore al la uzo de Esperanto en radio dum la Komerca Konferenco en Venecio, kiun partoprenis i.a. reprezentantoj de Radio-Elektraj Societoj. Ĝi konstatis, ke „la tutmonda disvastigo de senfadena telefonio nepre postulas rimedon por superi la lingvajn

barilojn kaj rekomendas la uzadon de Esperanto por komunikaĵoj destinitaj al eksterlanda aŭdantaro“.

Apartan signifon havis prepara Konferenco por Internacia Interkonsento pri Radiotelefonio en Ĝenevo okazinta unu jaron poste (1924) sub la patroneco de UEA kaj Svisa Radio-Elektra Societo. En ĝia fina rezolucio oni favoris la uzon de Esperanto por internaciaj radiodissendoj, instigis ke ĉiu radiostacio elsendu almenaŭ unu elsendon en Esperanto semajne kaj krome laŭeble elsendu E-kursojn. Oni gratulis ankaŭ la radiostaciojn en Eŭropo kaj Ameriko, kiuj jam komencis elsendi per Esperanto aŭ kiuj mem elsendis E-kursojn.

En 1927 jam 177 stacioj en 33 ŝtatoj uzis Esperanton en siaj elsendoj, 55 nacilingvaj radioĵurnaloj regule raportis, artikolis aŭ eĉ publikigis lingvokursojn sur siaj paĝoj. Deflanke de UEA funkciis Komisiono por Radiostatistiko tenanta kontaktojn kun esperantistoj respondecaj pri la E-programoj.

Kiam aŭdiĝis en 1922 la unuaj E-elsendoj de la Internacia Lingvo, per siaj sonprogramoj, kiel radioprelegoj, radiokursoj, raportoj pri E-eventoj, inkluzive de UK-oj ĝi superis la landlimojn vaste atingante esperantistojn. Apartan rolon ĝi plenumis por esperantistoj en izolitaj medioj sen E-kluboj kaj grupoj.

Grava partnero de la elsendoj fariĝis E-gazetoj, kiel *Esperanto*, *Heroldo de Esperanto*, *Nia gazeto* liverante ĝisdatigatajn informojn pri elsendoj de diversaj landoj kaj radiostacioj, pri ilia programo, kursoj.

Diversaj radiostacioj, iuj jam pli frue, kiel Prago, Brno, traktis temojn litigitajn kun sociaj aferoj, beletro, scienco, literaturo kaj aparte elsendis E-kursojn. Ekzemple la radiostacio en Prago estis inter la unuaj sendostacioj, kiuj disaŭdigis per Esperanto jam en 1923 interalie propagandajn paroladojn. Menciinda estas la radiostacio Brno, konata kiel Verda Stacio. Ĝiaj E-elsendoj komencis aperi jam en 1927, sed ĝi donis lokon al E-elsendoj ĉefe en la 30-aj jaroj, evoluigante sian programon de prelegoj ĝis ampleksaj plurtemaj elsendoj kun aparta atento al koncertoj, radioteatraĵoj, eĉ operoj k.s.

La esperantlingvaj elsendoj en plimulto funkciis ĝis la eksplodo de la 2-a mondmilito. Ankoraŭ en sia 28-a numero el 1939 *Heroldo de Esperanto* donas informojn i.a. pri Esperanto Radio-Programo por aŭgusto elsendata el Lille, Kortijk, Hilversum, Romo, Paris, Tŭri, Montpellier, Bordeaux, Marseille, Wallonia, Dublin, Budapest I, bulgaraj kaj danaj stacioj.

Eĉ se la 2-a mondmilito silentigis E-elsendojn kaj dekumis la E-komunumon, aparte en eŭropaj landoj, jam en 1945 ili reaperis en 8 radiostacioj. Ilia daŭro, ekesto kaj malapero ĉi-foje dependis ne sole de ekonomiaj motivoj (la neceso ŝpari), sed pli ofte estis motivita ankaŭ de politikaj cirkonstancoj, la tiel nomata Malvarma Milito. Ties viktimo fariĝis i.a. E-elsendoj el Varsovio, kiuj reaperis jam en 1945, sed finiĝis en 1950. Dum iuj elsendoj malaperis, la aliaj sendstacioj daŭrigis siajn programojn, kiel Radio Romo (1936-2007). E-elsendoj aperis en aliaj radiostacioj kiel Hilversum, Graz, Vieno. La evoluon de E-elsendoj sekvis UEA. En 1952 tre grava fariĝis la laboro de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvoproblemo de UEA, kadre de kiu oni komencis kolekti statistikon pri la radioelsendoj en Esperanto. Jam en la unua dokumentita jaro (1952) oni menciis 1820 regulajn E-programojn de 15 radiostacioj.

La limperiodo de la 90-aj kaj dumilaj jaroj alportis en iuj radiostacioj ŝanĝon de la teknikaj emisirimedoj. Krom mallongaj ondoj oni aplikis la persatelitan emisiadon, oni uzis Interreton. Samtempe la elsendoemisiado longe estis okazanta paralele, kiel en Pola Radio per mallongaj ondoj, satellite, rete. La apliko de podkasta teknologio vastigis la aŭditorion de la radioprogramoj. Ĝi ankaŭ instigis al kreado de radio-podkasto ekster la publikaj sendstacioj fare de individuaj esperantistoj kaj grupoj. Samtempe kun ĝi en 2011 kreiĝis la sondokumentaj podkasto de Esperanta RetRadio kaj Muzaiko, kadre de kiu junulara grupo komencis pretigi trihorblokan programon, ripetatan ene de tag-nokta daŭro.

Tiu ĉi artikolo nur supraj alrigardas la fenomenon de E-Radiofonio, ne menciante multajn aliajn programojn, kiuj dum jardekoj servis al

la E-komunumo. Kaj eĉ tio ne estis mia celo, kvankam eĉ tiuj informoj bildigas la fenomenon, kiun oni eble iom subtaksas. La jaro de la 100-jariĝo eble stimulos prilaboron de iom pli fidinda kaj ampleksa historia dokumento.

Kaj malgraŭ tio, ke la radio ne plu havas saman signifon kiel propagandilo kaj helpilo, kiel en 1922, la 100-jariĝo de E-Radio povas fariĝi okazo por entrepreni laborojn por protekti la ekzistantajn informojn kaj fontojn pri ĝiaj apero kaj evoluo en unuopaj landoj, por krei la rilatajn vikipediajn artikolojn pri E-radio.

Same kiel ni esploras niajn E-literaturon, lingvoevoluan, formadon de E-komunumo, la jaro 2022 instigu nin al ampleksa pritaktraktado de la E-Radiofonio, kies rolo kaj signifo ŝanĝiĝas, sed kiu estas kaj restos firma elemento de nia E-kulturo.

Artikolon de Barbara Pietrzak el la marta revuo *Esperanto* mallongigis Eva Pazourková

### **Trista anonco:**

La 4-an de februaro 2022 forpasis Ladislav Částečka (75-jara) el Lipník nad Bečvou, lokomotivestro, membro de AEH, ĈEA kaj ĈeFEA. Honoron al lia memoro.

**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**  
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice

Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová

Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,  
530 03 PARDUBICE, CZ tel. +420 721 537 970

e-mail: [ach@esperanto-ach.eu](mailto:ach@esperanto-ach.eu) interreto: [www.esperanto-ach.eu](http://www.esperanto-ach.eu)

Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010

Bankovní spojení: Fio banka, číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**

**IBAN:** CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX

La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)

Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)

Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.

Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z

La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.